Universala Esperanto-Asocio

EKO UKO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2015-33 sendita el Lillo, la 30an de julio. EKO-UKO numero 6*

# Forumo pri Kapabligo pretigis rekomendojn

La dua de la kvar forumoj okazis en mardo la 28an de julio kun la temo 'Kapabligo'. Gvidis la sesion la prezidanto de UEA, kune kun la vicprezidanto, kiu ja respondecas en la estraro pri Kapabligo. La unua temo estis Aktivula Maturigo. Aldoniĝas al la du akceptitaj seminarioj (Slovakio, Nepalo) komence de 2016 tri pliaj proponoj, el Indonezio, Turkio kaj Italio (tiu lasta pri la trejnado de trejnistoj). Diskutite la bezono por pli serioza hejmpaĝo por AMO kaj por nova administra teamo. Kresketas la financaj rimedoj por la programo.



**Jen podianoj kaj projekciaĵo dum komitata forumo – kiu tamen estas malfermita al ĉiu ajn kongresano. Fakte, la foto venas el la forumo pri Konsciigo kun kvin estraranoj ĉeestantaj.**

Dua temo estis la instruado, la kunlaboro kun ILEI kaj pliaj agantoj. Paralele kun okazigo de kursoj kaj trejnado, necesas elformi strategiojn pli bone subteni mem-lernintojn, kiuj finis retkursojn kiel *Duolingo* aŭ *uTalk* kaj bezonus gvidon al pliaj legaĵoj, revuoj, renkontiĝoj, por tiel plekti ilin en la komunumon. Konkreta plano estas revivigo de la projekto MITE – Modula Instruista Trejnado en Esperanto, por ke tia trejnado estu disponigita al homoj en mondpartoj, kie fizika trejnado ne atingeblas. Tuŝite la deziro iel akiri pli da financaj rimedoj, aldone al tiuj venintaj el la rimedoj por Movada Evoluigo. Venis propono, ke UEA kaj ILEI kune proponu al instruistoj pli simplan manieron membriĝi per unu movo en ambaŭ organoj – diskutenda kadre de la renovigenda retpaĝaro de UEA. La sesio kreis serion da rekomendoj por trakto en la Komitata kunsido vendrede.

# FORUMO pri KAPABLIGO - REKOMENDOJ

Kadre de 90-minuta diskuto pri tri ĉefaj subkampoj de Kapabligo, la partoprenantoj konsentis pri jenaj rekomendoj al la plena Komitato:

**1. Aktivula trejnado**

- Trovi administrajn fortojn por flegi la AMO-programon i.a. pere de signitaj buĝetaj rimedoj.
- Krei pli adekvatan retejan vizaĝonpor la AMO-programo, kiu fariĝu arkivo de seminariaj materialoj kaj laŭebleinkluzivu raportadon pri la postaj efikoj de la seminarioj.

- Realigi la projektonorganizi la unuan seminarion kun celo trejni trejnistojn, ekzemple en la kadro de planata kvintaga seminario de TEJO en Italio, paskon 2016.
- Surbaze de la sukcesa sperto de TEJO, UEA esploru la eblojn proponi aktivulan trejnadon interrete, ankaŭ uzante la jam disponeblajn materialojn.

**2. Kunlaboro pri edukado/instruado**

- Starigi pli fortajn partnerajn rilatojn kun la ĉefaj organizoj aktivaj sur la kampo de instruado: ILEI, edukado.net, lernu.net, TEJO, la ekzamenaj staboj k.a. Tio povus inkluzivi apartajn komunajn strategiojn kaj projektojn en specifaj mondopartoj, ekz. en Afriko.
- Responde al la alfluo de novlernantoj per retaj kursoj, poŝtelefonaj programmetoj k.s., kune kun tiuj partneroj ellabori strategion por stimuli kaj subteni plulernadon kaj enmovadiĝon, i.a. per taŭgaj retejaj rimedoj.
- Doni prioritaton en la instruakampo al la livero de kursoj konvenaj kaj allogaj por pli junaj homoj, kaj al la pristudado kaj plibonigo de kondiĉoj por memlernado flanke de pli aĝaj homoj.

**3. Rimedoj**

- Kreskigi la financan bazon por kapabligaj agadoj preter la nunaj buĝetaj rimedoj.

Vortoj: 460

*Jen kelkaj fotoj el la Kongreso: ĉiuj de Marija Belošević.*






*El la rimarkinda itala teatraĵo pri enmigrintoj: "Feliĉas Ĉiuj".* *El la nacia vespero.*





*Morine Stride el Francio prezentis muzikan interludon dum la inaŭguro.*
*Dekstre: Solenaĵo en la Tago de Lernado; la aljuĝo de la unua Premio Mauro la Torre al la universitata aganto, Davide Astori pro kompara analizo de tradukoj.*

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>. Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF.